IIa Jaro No 9 En Montrealo, Septembro 1903a




Presejo de "LA LUMO"

UNION 7 TYPO. ETIQUETTE JAC. CARTIER 145

# LA LUMO

Organo de la helpanta lingvo internacia "Esperanto"
Organe de la langue auxiliaire internationale "Esperanto"
Organ of the auxiliary international language "Esperanto"

Administracio kaj redakcio
Administration et rédaction
Administration and editorial offices
79 ST. CHRISTOPHER ST.,
MONTREAL, CANADA.

Jara Abono

Kanadlando kaj Unuigitaj Ŝtatoj... $0.50
Eksterlandoj... .... .... ... frankoj 3.00

Ni akceptas eksterlandajn poŝtmarkojn por la abonpago.

Abonnement annuel

Canada et Etats-Unis... ... ... ... $0.50
Etranger... ..... .... .... ....francs 3.00

Les timbres de poste, de quelques pays qu'ils soient, sont acceptés en paiement.

Annual Subscription

Canada and United States.. ... ... $0.50
Other Countries .... .... ... francs 3.00

Postage-stamps of all countries accepted in payment of subscriptions.


### Cours gratuit d'Esperanto à Montréal.

Le VENDREDI de chaque semaine, à 8 h. p.m., dans la salle du "Klubo Progreso", 137a rue Ste-Elizabeth.

Le MERCREDI de chaque semaine, à 8 h. p.m., dans la salle du Club Bernier, 956 rue Beaubien.

Cours publics et gratuits sous les auspices du Club Bernier.

Les 2e et 4e mercredis de chaque mois dans la salle des Forestiers Indépendants, Cour Chénier, à Ste-Cunégonde.

### Free Weekly Courses in ESPERANTO at Montreal

FRIDAYS, at 8 p.m., at the club-rooms of the "Klubo Progreso", 137a St. Elizabeth St., private lessons for the members of "Virina Klubo Progreso", (Ladies' Klubo Progreso), and of the "Klubo Progreso".

WEDNESDAYS, at 8 p.m., at the Bernier Club, 956 Beaubien St. Free Public Course, under the auspices of the Bernier Club.

2nd and 4th Wednesdays of every month, at 9 p.m., in the hall of the Independant Order of Foresters (Cour Chénier), at Ste. Cunégonde.

## LA INTERNACIA GAZETISTARO

Oni abonas la sekvantajn gazetojn, ĉe "LA LUMO".

### "LA LINGVO INTERNACIA"

monata gazeto por la lingvo Esperanto, Kosto de abono por jaro: 5.75 frankoj, aŭ $1.15. Abonoj estas akceptataj de l'komenco de ĉiu monato. Poŝtmarkoj estas akceptataj nur po 3/4 de iliaj valoroj. Tiu ĉi gazeto estas eldonata tute en Esperanto. Ĝi estas la unua gazeto eldonata per nia lingvo, kaj la sola presita tute esperante.

### "L'ESPERANTISTE"

organo propaganda de la lingvo internacia, eldonata en Franclando eliranta en la fino de ĉiu monato. Kosto de abono por jaro, abono simpla 3.50 frankoj, kun aldono 4.50 frankoj. La abonoj estas akceptataj, komencante de la 1a de januaro aŭ de la 1a de julio. Se oni abonas inter tiuj ĉi du datoj, oni ricevas la numerojn elirantajn de la komenco de l'duonjaro. "Progresado estas vivo. Restado estas morto". Tiu ĉi gazeto estas la oficala organo de la Societo por la disvastiĝo de Esperanto.

Ce journal est publié en Français et en Esperanto.

This paper is published in French and Esperanto.

### "RONDIRANTO"

ilustra gazeto de l'Bulgaraj por propagando de l'lingvo internacia Esperanto. La gazeto eliras ĉiumonate; jaro abono 3.50 frankoj. Ĉiu abonanto estas membro de l'klubo "Stelo" en Filopopolo.

Ce journal est publié en langue bulgare et en Esperanto. Abonnement: 3.50 frs.

This paper is published in two languages, Bulgarian and Esperanto. Subscription: 3.50 francs.

### "ESPERANTO"

Monata hispana-amerika organo propaganda de la lingvo internacia, en la duoninsula kaj latinaj amerikoj.

Director; Andrés Bravo del Barrio.

Redaccion y Administracion : Preciados, 60, 2e. Madrid, Hispanlando.

Kosto de jara abono: Hispanlando, kaj Portugalando: 3 pts.; Fremlandoj: 4 pts.

"La gramatica Esperanto se aprende "en menos de una hora y su languaje est "completamente fonetico".

Ce journal mensuel est publié en espagnol et en esperanto. Abonnement 4 frs.

This monthly review is published in Spanish and Esperanto. Subscription, 4 frs.

### "LA HOLANDA PIONIRO"

Regula monata gazeto kaj tempa ligilo inter la esperantistoj en holande parolantaj landoj. Abono kostas por jaro (12 libretoj) kun enskribo kiel membro de la klubo. "Estonteco estas nia". 6 fr.— La jara abono por membroj de aliaj Esp. societoj estas 4 fr. — Oni sendu la abonojn al : Dreves Uitterdijk, Hilversum, Holando.

Ce journal est publié en langue hollandaise et en Esperanto.

This paper is published in Dutch and Esperanto.

### "LA BELGA SONORILO"

Gazeto esperantista eliranta ĉiumonate en Belgujo. — Kosto de la jaro abono: 3 fr. — Oni sendu la abonojn al: M. Seynayeve, Coutrai, 3, rue de l'Avenir. Belgujo.

Ce journal est publié en français, en flamand et en esperanto.

This monthly review is published in French, Flemish and Esperanto.

### "L'ESPERANTISTA"

Organo propaganda de la lingvo internacia Esperanto, eliranta ĉiumonate. — Kosto de la jara abono: Por Itallando, 2 frankoj. Por fremdlandoj, 4 frankoj.— Tiu jurnalo estas verkita ambaŭ Itale kaj Esperante. — Redakcio kaj administracio: Via S. Secondo, 22, Turin, Italie.

Ce journal est publié en langue Italienne et en Esperanto.

This paper is published in Italian and Esperanto.

### "BOHEMA ESPERANTISTO"

Propaganda organo de Esperanto. Eliras ĉiumonate. — La jaran abonon 1 fr. 50 cent. oni sendu al: Administracio de la "Revuo Internacia", Bystrice-Hostyn, Moravujo, Aŭstrujo.

Ce journal est publié en langue Tchèque et en Esperanto.

This paper is published in Tcheque and Esperanto.

### "GERMANA ESPERANTISTO"

Propaganda organo de Esperanto. Eliras ĉiumonate. — La jaran abonon 1 fr. 50 cent. oni sendu al: Administracio de la "Revuo Internacia".

Ce journal est publié en langue allemande et en esperanto.

This paper is published in German and Esperanto.

### JUNAJ ESPERANTISTOJ DE GENEVO

Organo privata de l'Klubo de junaj esperantistoj de Genevo. Redakcio: Hector Hodler, 9 avenue des Vollandes. Administracio: Edmond Privat, 10 Bld. de Florissant, Genève, Svisujo. Pri ĉiuj sciigoj, sin turni al unu el la du adresoj ĉi supre.

### ESPERO KATOLIKA

Societo por la vastigado de l'lingvo Esperanto inter la katolikoj. Fondinto-Direktoro: Abato Em. Peltier, en Cheillé, per Azay-le-Rideau, Indre-et-Loire, Francujo. Jara kotizaĵo por E. K., 2 fr. Abonkosto jara por la revuo: En Francujo, 1 fr.; En eksterfrancaj landoj, 1 fr. 50.

## KLUBO PROGRESO

**137a rue Ste-Elizabeth**

Les réunions du "Klubo Progreso" ont lieu tous les lundis à 8 hrs p.m. Tous les membres du "Klubo Progreso" devraient se faire un devoir d'y assister.

ooo

La salle du "Klubo Progreso" est ouverte tous les jours à tous les membres qui peuvent venir lire les journaux et revues échangés avec l'organe officiel du "Klubo Progreso": LA LUMO.

ooo

Le premier vendredi de chaque mois est exclusivement réservé à 8 h. p.m., aux dames espérantistes du "Virina Klubo Progreso".

# AVIZO GRAVA

AL NIA LEGANTARO

Kiel ni ĝin skribis en nia lasta numero, ni deziras ke niaj eŭropaj legantoj ne alsendu plu siajn abonpagojn al "La Lumo" dum tiu jaro 1903a.

Efektive, deciditaj apogi kaj subteni el niaj tutaj fortoj la jam komencitan movadon pri la blinduloj, ni oferas tutkore niajn enspezojn eŭropajn de tiu ĉi jaro por la enkonduko de Esperanto inter la malfeliĉaj blinduloj.

Kiu do abonos La Lumon dum tiu ĉi jaro, tiu duoble trafos, unue, li ricevos nian revuon, kaj due, helpos efektive al la nobla movado supredirita; ju pli oni abonpagos, des pli helpata estos tiu movado bonega.

Tamen, por ke oni ne suspektu ĉe ni gajnan senton—kiu ne estas—ni petas niajn eŭropajn legantojn ke ili sendu siajn abonpagojn por 1902 aŭ 1903 aŭ ambaŭ, al sinjoro Paul Fruictier, 27 Boulevard Arago, en Parizo. Tiu sinjoro bonvolos nin sciigi la nomon de ĉiu el niaj legantoj abonpaginta al li.

Nun, ni deziras sukceson kaj trafon al la movada pri la blinduloj.

LA REDAKCIO.

### la grandaj literoj

ni komencas hodiaŭ serion da artikoloj pri la grandaj literoj kaj ni tuj diros kian estas nia celo. ni deziras, en "esperanto", malaperigi la grandajn literojn, ilin mortigi, se eble, kaj ju pli rapide ni tion faros, des pli bone tio estos por nia afero.

tial, kiel niaj legantoj ĝin rimarkos, pro la tialoj esprimitaj sube, ni konsideras ke la grandaj literoj en 'esperanto' ne estas necesaj, kaj por praktike elmontri tiun veron, ni tute presigis tiun artikolon nur per malgrandaj literoj.

ni do petas de la esperantista presaro, ke ĝi konsideru serioze tiun gravan demandon proponitan de ni, ke ĝi altiru al ĝi la atenton de ĉiuj esperantistoj, kies esprimitan opinion pri tio, ni bonvole akceptos. siaflanke "la lumo" publikigos ĉion, kion oni sendos al ĝia administracio pri tiu punkto, pri kiu ni praktike akceptas la politikon de la "malfermita pordo".

#### graveco de la demando

la demando estas multe pli grava por "esperanto", ol por kia ajn lingvo, ĉar en "esperanto" la supersignoj tute ŝanĝas la valoron de la literoj, kio nin devigas ilin uzi super la grandaj literoj. en la lingvo franca, oni ankaŭ uzas la supersignojn, sed, kiel tiuj supersignoj ne multe ŝanĝas la fonetikan valoron de la literoj francaj, oni preskaŭ neniam uzas ilin super la grandaj literoj en la presado, kaj tio ne estas tiel grava, kiel en "esperanto", se do ni ne povas en "esperanto" uzi la tutajn grandajn literojn sen supersignoj, ni tuj elmontros kial ni devas ilin malaperigi.

la mankompostado estas de nun difinita por malaperi anstataŭota de la maŝinkompostado, tial ni devas konsideri por "esperanto" la novajn kondiĉojn kreitajn de tiu neevitebla pliboniĝo.

nuntempe estas tri rimedoj, per kiuj oni povas skribi aŭ presi esperanton. 1. per la klavigrafo aŭ daktilografo; 2. per la kompostmaŝino; 3. per la mankompostado.

per la klavigrafo, oni ne povas supersigni la grandajn literojn, escepte se ni mendus specialan tiplevilon, kio ne estas farebla por ĉiuj klavigrafoj, donante tiel multe da malfacilaĵoj.

per la kompostamaŝino, tial ke la grandaj literoj atingas ĝis la supran randon de la liniaĵo en tiu maŝino, estas ankaŭ neeble aldoni supersignon al tiuj literoj; estas vere ke ni jam presigis vortaron esperantan per maŝino nomita linotipo (linotype), uzante la grandajn literojn, sed ni devis por tio malgrandigi la supersignotajn grandliterojn, detranĉante ilian supron, por ke ni estu povontaj ilin supersigni; cetere, tio estas malbela kaj neregula, ne parolante pri la kosto de la maŝinkompostado, kiu estas multe pli kara. efektive, por presigi nun esperanton per tiuj maŝinoj, estas bezone ke ni ŝangu ilian tutan meĥanismon, kio ne estus necesa, se ni havus nur malgrandajn literojn.

fine, per la mankompostado, ni ankaŭ renkontas tie ĉi multe da malfacilaĵoj kaŭzitaj de la grandaj literoj. estas nun multekoste por aĉeti aŭ farigi esperantan tiparon kaj, kiel pri ĝi plendis laste sinjoro ruyssen, en "la paix par le droit", estas nun neeble presigi dek liniojn esperantajn, ekstere malgrandega nombro da urboj kaj presejoj. tia neebleco konsistas en tio, ke nun bezone estas farigi dekdu specialajn matricojn por fandigi la supersignitajn litertipojn, kio duone malgrandigus la koston de l'tiparo.

plie, uzante la grandajn literojn, la kompostistoj devas elpinĉi la tipojn el ambaŭ la alta kaj la malalta fakaroj; male, uzante nur la malgrandajn literojn, iliaj manoj trakurus nur tra la malalta fakaro, je kiu ili estas pli kutimaj, ŝparante tiel pli da tempo, kaj elspezigante malpli da mono de la esperantistoj, kio estas sufiĉe grava.

tial, kiel oni certe konsentos, la malapero de la grandaj literoj estas pli grava demando en esperanto, ol en kia ajn lingvo. ni vidos en nia proksima numero, ĉu la grandaj literoj estas necesaj kaj eĉ utilaj.

(daŭrigota).

## CAPITAL LETTERS

We commence to-day a series of articles concerning capital letters and we shall at once state the object we have in view. We desire to do away with capital letters in Esperanto, to kill them if possible and the quicker we can

do this the better will it be for our cause.

Therefore, as our readers will remark, for the reasons expressed below, we consider that capital letters are not necessary in Esperanto and to demonstrate this truth in a practical manner, we have pointed this entire article in small letters only, (in Esperanto).

We therefore beg the Esperantist press to seriously consider this important question which we propose let it draw to this point the attention or all Esperantist, whose expression of opinion upon the subject we shall willingly accept. On our part, La Lumo will publish all that may be sent to its administration concerning this point, on the subject of which we accept practically the policy of "the open door".

## IMPORTANCE OF THE SUBJECT.

The question is much more important for Esperanto than for any other language, as in Esperanto the accents on letters compleetely change the value of letters, which obliges us to use them on the capital lettres. Accents are also employed in French, but as these accents do not change very much the value of the French letters, they are hardly ever used on capital letters in printing and nothing serious results from this, as would be the case in Esperanto. If, therefore, we cannot in Esperanto use all the capital letters without accent, we will point out here why we must de away with them.

Composition by hand is henceforth destined to disappear, to be replaced by composition by machine, so that for Esperanto we must consider the new conditions created by this inevitable improvement.

To-day, there are three ways by which Esperanto can be written or printed. 1. By the clavigraph or dactylograph; 2. by the type-setting machine; 3. by hand composition.

By the clavigraph, capital letters cannont be accentuated without at least having a special type-bar, which cannot be done for all clavigraphs, and which causes many difficulties.

By the type-setting machine, in view of the fact that the capital letters attain the utmost height of the line in these machines, it is still impossible to add the accents upon these letters; it is true that we have already had an Esperanto dictionary printed, by means of a machine called the linotype, employing capital letters, but to carry this out we had to shorten the capital letters which had to be accentuated, lopping off a part of their heads in order to be able to accentuate them; moreover this is ugly and irregular, without speaking of the cost of composition, which is much greater. In fact, to have.

Esperanto printed at present by means of these machines, their whole mechanism must be changed, which will not be necessary if we use small letters only.

Finally, by hand composition. Here again we encounter much difficulty caused by capital letters. It is very costly to purchase or to have made a collection of Esperanto types, and, as M. Ruyssen recently complained in "La Paix par le Droit," it is now impossible to have ten lines of Esperanto printed outside of a very small number of towns and printing establishments. Such an impossibly arises from the fact that at present we must have twelve special matrices made in order to cast the accentuated letters, while it will only be necessary to have six if we employ small letters only which will lessen by one half the cost of these characters.

Moreover, in employing capital letters, compositors have to pick up letters at the same time from the upper and the lower case; on the other hand, in employing small letters only, their hands will have only to run over the lower case to which they are more accustomed, thus saving more time and costing much less money to Esperantists, which is important enough.

Therefore, as will certainly be recognized, the disappearance of capital letters is a more important question in Esperanto than in any other language. We shall see in our next number if capital letters are necessary or even useful.

(to be continued.)

## LES MAJUSCULES

Nous commençons aujourd'hui une série d'articles sur les majuscules et nous allons dire de suite quel est notre but. Nous désirons en Esperanto faire disparaître les majuscules, les tuer si posble et plus vite nous le ferons, mieux ce sera pour notre cause.

C'est pourquoi, comme nos lecteurs le remarqueront, pour les raisons ci-dessous exprimées, nous considérons que les majuscules en Espéranto ne sont pas nécesaires, et pour démontrer cette vérité d'une manière pratique, nous avons tout imprimé cet article qu'au moyen des minuscules (en espéranto).

Nous prions donc la presse espérantiste de considérer sérieusement cette question importante que nous proposons, qu'elle y attire l'attention de tous les espérantistes dont nous accepterons volontiers l'expression d'opinion à ce sujet. De son côté "La Lumo" publiera tout ce qu'on enverra à son adminstration, touchant ce point, au sujet duquel nous acceptons pratiquement la politique de "la porte ouverte."

## IMPORTANCE DE LA QUESTION

La question est beaucoup plus importante pour l'Esperanto que pour n'importe quelle autre langue, car en Esperanto les accents changent tout-à-fait la valeur des

# The Underwood Typewriter




THE UNDERWOOD

**Visible writing** **Great speed**
**Elastic Touch** **Tabulating rapid and easy**
**Manifolding simplified.**

SUPERIOR ON ALL POINTS

La Underwood skribmaŝino
Videbla skribaĵo
Granda rapideco Elasta tuŝo
Rapida kaj facila tabeligo
Multigado simpligita
Supera pri ĉiuj punktoj

Creelman Bros., Typewriting Co., 97 St-Francois-Xavier, Montreal

**Branches à Toronto, Hamilton, London, Ont.**


letters, ce qui nous oblige à les employer sur les majuscules. On emploie aussi les accents en français, mais comme ces accents ne changent pas beaucoup la valeur des lettres françaises, on ne les emploie presque jamais sur les majuscules dans l'imprimerie et il n'en résulte rien d'aussi grave qu'en Esperanto. Si donc en Esranto nous ne pouvons employer toutes les majuscules sans accent, nous allons indiquer de suite pourquoi nous devons les faire disparaître.

La composition à la main est désormais destinée à disparaître devant être remplacée par la composition à la machine, c'est pourquoi nous devons considérer pour l'Espéranto les nouvelles conditions créées par cette amélioration inévitable.

Aujoud'hui il y a trois moyens par lesquels on peut écrire ou imprimer de l'espéranto. 1. par le clavigraphe ou dactylographe; 2. par la machine à composer; 3. par la composition à la main.

Par le clavigraphe, on ne peut accentuer les majuscules, à moins de commander un levier spécial, ce qui ne peut être fait pour tous les clavigraphes, causant ainsi beaucoup de difficultés.

Par la machine à composer, vu que les majuscules atteignent la limite supérieure de la ligne dans ces machines, il est impossible d'ajouter les accents sur ces lettres; il est encore vrai que nous avons déjà fait imprimer un dictionnaire espéranto, au moyen d'une machine appelée "Linotype", en employant les majuscules, mais nous dûmes pour cela raccourcir les majuscules que devaient être accentuées, retranchant une partie de leur sommet pour pouvoir les accentuer; du reste, ceci est laid et irrégulier, sans parler du coût de la composition qui est beaucoup plus cher. En effet, pour imprimer maintenant de l'Espéranto au moyen de ces machines, il faut changer tout leur mécanisme, ce qui ne serait pas nécessaire si nous n'avions que les minuscules.

Enfin, par la composition à la main, nous rencontrons encore ici beaucoup de difficultés causées par les majuscules. C'est maintenant bien coûteux d'acheter ou de faire faire un recueil de types espéranto, et comme s'en plaignait dernièrement monsieur Ruyssen, dans "La Paix par le Droit", il est maintenant impossible de faire imprimer dix lignes d'Espéranto en dehors d'un nombre infime de villes et d'imprimeries. Une telle impossibilité provient de ce que maintenant il faut faire douze matrices spéciales pour faire fondre les types-lettres accentués, tandis qu'il n'en faudrait que six, si nous n'employions que les minuscules, ce qui diminuerait de moitié le coût des caractères.

De plus, en employant les majuscules, les typographes doivent puiser les types à la fois dans le haut et le bas casier; au contraire, en employant que les minuscules, leurs mains n'auraient qu'à parcourir le casier du bas auquel elles sont plus accoutumées, épargnant ainsi plus de temps, et faisant dépenser moins d'argent aux espérantistes, ce qui est assez important.

C'est pourquoi, comme on le reconnaîtra certainement, la disparition des majuscules est une question plus importante en Espéranto qu'en n'importe quelle autre langue. Nous verrons dans notre prochain numéro si les majuscules sont nécessaires et même utiles.

### AVIZO

Ni ofte ricevas proponojn diversajn pri la kreado aŭ aliformigo de novaj radikoj en Esperanto, precipe pri la nomoj de bestoj aŭ kreskajoj. Tial ke la afero estas interesinda kaj bezonas publikan kritikadon, La Lumo komisiis unu el siaj redaktoroj por esplori tiujn demandojn kaj raporti pri ili ĉiumonate en la ĵurnalo. Oni do sin turnu SENPERE por ĉiuj proponoj aŭ demandoj rilatantaj al radikoj aŭ vortoj, al nia kolego: Sinjoro Paul Berthelot, Céret, P. O., France.

Pri ĉiu demando estos raporto en sekvanta numero de LA LUMO kiu demandos nian legantaron pri sia opinio.

Nia fervora samideano bonvole konsentis akcepti tiun proponon kaj fari specialan esploron pri kia ajn demando rilate radikvortojn pro kio li akceptu niajn dankojn.

LA LUMO.

### JUNAJ ESPERANTISTOJ

Tiu revuo estas por la geknaboj esperantistaj tre oportuna, ni petas de ĉiuj junaj esperantistoj, ke ili skribu al la redaktoro de tiu revuo, Sinjoro H. Hodler, avenue des Vallandes 9, Genève, Suisse.

Estas multe da malgrandetaj demandoj kiuj interesas la knabaron, kaj ne la maturajn homojn, tial ke la knaboj sin grupiĝas por interkomunikiĝi, ĉirkaŭ komuna standardo, la bela revueto "Junaj Esperantistoj".

## LA DEMANDO PRI LA LANDONOMOJ

Kelkaj esperantistoj doninte sian opinion pri tiu ĉi demando, ne estos neutile resumi ĝin, tion pli ke ĝi ne estos juĝita, kaj ke:

1. Gi tuŝas nek regulon, nek principon, nek la vortaron de Esperanto.

2. Tamen ĝi estas tre grava, ĉar ĝi mirigas niajn kontraŭdirantojn, kaj estas haltigilo por la novaj adeptoj pro ĝia komplekso, (kion montros tiu ĉi artikolo), kaj objekto de disputo por niaj samideanoj.

Kiu parolas por la bono, prave parolas.

Do, la dirita demando bezonas solvon kaj tio ĉi neniel povas esti danĝere por ni antaŭ niaj kontraŭdirantoj, ĉar en tiu solvo neniu povus vidi reformon sed simple klarigon, pli konvenan uzadon de niaj reguloj.

Kiel komprenigi ke estas necese regulo tiel kompleksa kiel tiu, kiu estas pli malsupre montrata, por obteni tiel simplan rezultaton kiel estas la nomoj de la nacioj. t. e. vortoj de la familioj havantaj kiel radikoj, la radikojn landonomajn, vortoj kiuj DEVUS esti internaciaj kiel estas internacie konataj la nacilingvaj nomoj de la nacioj. Kiel komprenigi al estonta adepto ke estas necese por obteni tiun rezultaton koni aŭ historion, aŭ lingvistikon, aŭ etimologion, kiam aliflanke oni diras ke Esperanto estas plej simpla por ĉiuj homoj de ĉia klero, kaj tio, por vortigi substantive radikon adjektivan?

Ni vidu la manierojn uzatajn kaj proponitajn por vortigi la landoradikojn:

Unue per "uj" absolute, proponita de kelkaj esperantistoj, el tiuj Sro. Selesnjov (vidu Hollanda Pioniro) apogante sin sur citaĵo de Dro. Zamenhof — verko No. 77.

Radikoj: — Franc-a Holland-a Belg-a Kanad-a Skot-a

Landoj: — Franc-uj-o Holland-uj-o Belg-uj-o Kanad-uj-o Skot-uj-o

Nacianoj: — Franc-o Holland-o Belg-o Kanad-o Skot-o

Loĝantoj: — Franc-uj-an-o Holland-uj-an-o Belg-uj-an-o Kanad-uj-an-o Skot-uj-an-o

A. Tiu maniero havus du ecojn tre ŝatindajn: ĝi estus SIMPLA kaj SENESCEPTA: unu regulo sufiĉus.

B. Sed, ni rimarkas ke, en la vortoj finiĝantaj jam radike per "land", kiel Holland', Island', Irland', tiu finiĝo signifas nacilingve kiel esperante. La almeto de "uj" donas do pleonasmon: LANDO KIU ENHAVAS LA LANDON.... Tiam Hollandujano signifas : "membro loĝanta en la lando enhavanta la landon kie loĝas".....

C. Pro tio tiu ĉi regulo ne povas esti akceptata.

Tamen la proponito montras ekzemplon donitan de Dro. Zamenhof en la verko No. 77: "La Hollandoj, la Irlandoj". Se tion estus recertigita, nenio malhelpus ke la proponita regulo estu akceptata, kaj la demando ricevus plej simplan solvon.

Due per "land'".

Tiu maniero ne estas ABSOLUTA, sed ĝi tamen estas uzata ĝenerale de kelkaj esperantistoj kaj gazetoj.

Radikoj:—Franc-a Holland-a Belg-a German-a Kanad-a

Landoj: — Franc-land-o Holland-o Belg-land-o German-land-o Kanad-land-o

Nacianoj:— Franc-o Belg-o German-o

Loĝantoj:— Franc-land-an-o Belg-land-an-o German-land-an-o Kanad-land-an-o.

Ni rimarku, pasante, ke la vortoj "Francano, Germano" iafoje uzataj, ne havas la sencon de "loĝanto" al ili donata, sed signifas "partiano" de la popolo Franca, Germana.

A. Tiu supra regulo ne estas absoluta, senescepta. Efektive, en du ekzemploj ni ne havas la plenon de la familio: kun "Holand'" ni havas vorton nek por la lando, nek por la naciano, nek por la loĝanto formitajn laŭ la regulo: cetere, kun "Kanad'" mankas nur unu vorto: la naciano.

B. Jen la rimedoj por kompensi tion ĉi, t. e. por plenigi la familion:

A.—en la okazoj kiel kun Holland', oni nenian finiĝon almetas por obteni la landonomon, ĉar, kiel montrita, tio donus pleonasmon. Tial, Holland-o signifas la landon, kvankam alie la radiko substantivigita signifas la nacianon. Sed, estis dirite, la regulo ne estas absoluta.

B.—Ĉar estas neeble traduki la nacianon, oni diras: Holland-an-o, kio devus signifi: loĝanto de Hollando. Do "ano" signifas loĝanto en Franc-land-an-o, kaj naciano en Holland-an-o.

C.—Ĉar plie, kaj sekve, regula formo mankas por obteni la nomon de la loĝanto, kiel Franc-land-an-o, oni devas diri: la loĝantoj de Hollando.

Franc-a Franc-uj-o Franc-o Franc-uj-an-o

Do, kaŭzoj de eraroj en la senco aldonata al sufiksoj krom senregula escepteco.

B. Kia longeco, kia pezeco en la vortoj Franclando, Franclandano, Germanlando, Germanlandano k. t. p.

C. Kaj kia malsimpleco.

Germanlando signifas loĝanto de la lando kiu enhavas la Germanojn: Hollandano, naciano de la lando HOLLAND-A, (kaj ne HOLA).

Trie per "uj" neabsolute. — Plej ĝenerale uzata kaj ankoraŭ pli malsimpla ol la antaŭa. Iafoje oni uzas "uj", iafoje nenian finiĝon, (krom uzo de "land'" kio ne estas malpermesita).

Radiko : — Franc-a Rus-a Kanad-a Holland-a

Lando: — Franc-uj-o Rus-land-o Kanad-o Holland-o

Naciano: — Franc-o Rus-o

Loĝanto : — Franc-uj-an-o Rus-land-an-o

Kiel vidiĝas la landoj havas nomojn devenantajn de la radikoj, unua kun aldono de "uj", alia de "land'" alia de "o" simple.

B. La nacianoj de Hollando, Kanado, k. t. p. ne havas vortigon: oni diras loĝanto de Hollando, de Kanado: Kanadano, Hollandano.

C. Oni ne povas rekte obteni la nomon de la loĝanto de tiuj samaj landoj; oni diras: loĝanto de Kanado, de Hollando.

D. Ankaŭ estas neeble havi nomon por la partiano. Oni diras Francano, Belgano sed oni ne povas diri Hollandano, Kanadanano (partianoj de la Francoj, Belgoj, Hollandanoj, Kanadanoj) kio tamen estus regula.

E. Kiam uzi "uj", (kiam "land") kaj kiam nenian sufikson ? Oni uzas "uj" kiam la ideo de la RASO superas tiun de la lando:.

Francujo, lando enloĝata de la Francoj, de la raso franca. Tamen, iafoje oni ne klare vidas tion, kio estas la raso. Sed, oni kvankam uzas "uj" (Tion ĉi la regulo ne diras, sed efektive tio ĉi estas escepto). Ekz.: Norvegujo, Svisujo, Belgujo.

Kiam la ideo de la raso ne superas tiun de la lando, oni devenigas la nomon de la lando rekte de la radiko:

Kanad' — Kanado (lando).

Peru' — Peruo (lando).

Kun Franc', vera lando de la Frankidoj, la radiko devenas de la nomo de la raso kiu antaŭ centoj da jaroj ekokupis la landon, kaj tial prave nomas la landon. Sed kun Norveg', kion signifas Norvegujo? Kion signifas Svisujo, lando loĝata de Francalingvaj, Germanlingvaj, Itallingvaj homoj, kaj kie neniel troviĝas ĉefa raso Svisa kies ideo superas tiun de la lando? Same por Belgujo.

Estas netrovebla la diferenco inter la ideo de la lando Kanada kaj tiu de la lando Svisa ĉe la vidpunkto de la nunaj loĝantoj, aŭ pli bone nacianoj, kiuj okupas tiujn landojn. Pro kia kaŭzo preferi "uj" por Svis' kaj "o" por Kanad'? kaj nun la rasoj Hollanda, Irlanda, Islanda ne havas la rajton nomi la landon, pro la kaŭzo jam dirita ke la radikoj jam enhavas la ideon de lando.

Kvare per "o" kaj "ulo".

Tiu ĉi maniero estus la plej simpla, ĉar sufiĉas aldoni al la radiko la signon "o" por ke ĝi donu la landnomon.

Radiko : — Holland-a Franc-a Kanad-a Hispan-a
Lando: — Holland-o Franc-o Kanad-o Hispan-o
Naciano: — Holland-ul-o Franc-ul-o Kanad-ul-o Hispan-ul-o
Loĝanto: — Holland-an-o Franc-an-o Kanad-an-o Hispan-an-o
Partiano: — Holland-ul-an-o Franc-ul-an-o Kanad-ul-an-o Hispan-ul-an-o

La naciano estas karakterigita per "ul". La lando per "o" ĉar ĝi estas la vera substantivo. Tiu ĉi maniero de vortigo prezentas sep ecojn mankantajn al la aliaj:

1. Reguleco, senesccepteco — ĝi akceptas nenian esccepton.

2. ABSOLUTECO — ĝi estas ĉiam uzebla, en ĉiuj okazoj, por ĉiuj nomoj geografiaj. (Ameriko, — amerikano, — loĝanto de Ameriko, amerikulo, naskita en, ulo de Ameriko. — Parizano, loĝanto de Parizo, — Parizulo, naskita en Parizo "infano de Parizo". Ul' efektive donas tie aŭ tie ĉi).

3. FACILECO, SIMPLECO por la lernantoj. — anstataŭ la malsimpleco de la supraj reguloj.

Efektive, nune estas necese koni:

a—ĉu la lando estas nacio aŭ ne.

b—ĉu en tiu lando la raso estas pli konsiderinda ol la lando.

c—ĉu estas necese finiĝo.

d—ĉu tamen radiko ne prezentas esccepton.

Kiam la nova adepto al si respondis pri tiuj ĉi kvar punktoj, se estas necesa finiĝo, li ankoraŭ povas elekti inter "uj" kaj "land'".

Ne sole tio ĉi estas malhelpo por la lernanto, sed de longe kontraŭdiroj aperas pri tiu demando. Tial ĝi estas kaŭzo de malkonsento inter esperantistoj. Tion pruvas la apero en 1894, de Dro. Zamenhof, de propono pri sufikso landnoma kiu estus "i". Tion pruvas ankoraŭ la artikoloj publikigitaj jam en kelkaj gazetoj pri landnomoj.

Ĉu vere solvo ne estas necese?

Anarĥio daŭras regi niajn gazetojn koncerne la ortografio de la landnomoj, krom la formo de tiuj nomoj.

Oni renkontas: Francujo, Francolando, Franclando, Anglujo, Anglolando, Anglalando, Britanlando, Britanujo, Svisolando, Svislando, Svisujo, Svislando, Peruo, Perulando, Kanado, Kanadlando, k. t. p. — k. t. p. kia senakordo.

Do, ĉu estas necese koni historion, lingvistikon aŭ etimologion por uzi Esperanton aŭ por ĝin lerni? NI ne DEVUS mem ĉerpi fundamentojn, kiam ni vortigas, en tiuj ĉi sciencoj.

Mi ne diris ke la LANDO baptonomas la nacianon, sed ke ni bezonas ian rimedon pli facilan ol la nuna, pli internacian kaj pli simplan. Ne estas necese por tio ke ni kalkulu, serĉu, trovu ĉu lingvistike nia lingvo estus prava devenigante la nomon de la naciano de tiu de la lando. En tiu ĉi demando kiel en multaj aliaj Esperanto ne estas devigata kopii niajn lingvojn. Cetere oni povas trovi ke en niaj lingvoj ofte la nomo de la naciano devenas de la nomo NUNA de la nacio. Ekz. "Français" devenas de "France" kaj plu ne bezonas scii ĉu "France" devenas de la raso "Franka".

Resume kia rimedo, kia DEKLINACIO estas pli FACILA, pli SIMPLA, pli INTERNACIA, pli PRAKTIKA, pli UZEBLA, pli LOGIKA, aŭ nomi la LANDON laŭ la landano aŭ nomi la LANDANON laŭ la lando kiu ĝin nutras, tio ĉi per certaj reguloj senesceptaj?

4. MALLONGECO de la vorto, kion montras la komparo de la formoj en la supraj tabeloj.

Pro la sama kaŭzo kial Luksemburgo estas pli preferinda ol Luksemburglando, tial Franco estas pli preferinda ol Francujo aŭ Francolando, tial ankaŭ Francano estas pli preferinda ol Francujano aŭ Franclandano.

5. PLENO DE LA FAMILIO de vortoj en ĉiuj okazoj.

6. EBLECO ne ALIIGI la formon, la ortografion pli universale konatan, la NOMON de la lando, kiu, la unua en la nacio, la ĉefa, estas internacia. Anstataŭ tio unue tiu vorto ĈEFA estas aliformigita per aldono de "uj" aŭ "land". Ĉu tiu demando ne estas prava kaj grava : "Kial ŝanĝi la nomon de la lando, senutile, malutile, kontraŭ internacieco ?"

"France" estas ĉie konata kiel lando — ĝi restu "France'o kaj el tiu vorto esenca de la familio de landovortoj, ni eltiros kion ni bezonas.

7. El tio sekvas ke la internacieco estus pli granda en la familio de la landovortoj: grava punkto tre konsiderinda. — La supra regulo NE riskas TRO DIFERENCIGI la landonomojn esperantajn (1) de la landonomoj nacilingvaj, KONTRAŬE kia vorto estos pli internacia en la familio de landovortoj, kia estas la geografia, se ne la nomo mem de la lando?

Ĉu Français, Englishman, Deutsch estas pli universalaj pli universale konataj ol France, England, Deutschland ?

Kaj sekve, ĉu en Esperanto, la internacieco ne apartenas al la landonomo? Nune ĝi estas donata al la naciano, kvankam la formo, la ortografio de la nomoj de naciahoj ĉe l'unua vido montras klare nomon de lando.

En ĉiu okazo, neniel povus foriĝi el la novaj formoj la ideo de raso: kontraŭe ĝi estus plifortigita: ĉu Franculo, Germanulo ne pli profunde nomas la NACIULON ol Franco, Germano?

Ĉe la vidpunkto estetika Franculo, Hispanulo, Svedulo ŝajnas pli bonsonaj — kun ilia signifo propra — ol Francujo, Hispanujo, Svedujo kun sia.

8. Ĉiu vorto havas sian veran signifon. Ĉu "ul" ne tute vere tradukas la ideon de "homo karakterizata per la esenco nacia? Ĉu ĝi ne tute precize donas la signifon NACIULO?

Ni vidu la signifojn de la vortoj uzataj nune:

Francujo — lando de la Francoj.

Franco—? (Kial tiu vorto signifas estajon, homon?) Kia signo donas tiun signifon) naciano de Francujo, t. e. de la lando de la Francoj. Ĉu tio ne estas nelogikeco?

Mi tiel same akceptas "Hollandujo".

* * *

Nun oni demandos: Ĉu ne ekzistas motivoj por neakcepto de tiu nova maniero de vortfarado.

La respondo estas simpla: "Tiu maniero ŝanĝas nenion en la vortaro, nenion en la gramatiko, nenion en la principo, de Esperanto. Ĝi do ne tuŝas la esencon de Esperanto, ĜI NE ESTAS REFORMO".

Ĉu tio ne sufiĉas por akceptiĝi ĝin?

PAUL BAVAY.

Rimarko. — Neniel mi diris ke la naciano devas esti nomata Francano, Belgano k. t. p., sed Franculo k. t. p.

---

PRAGANO KAJ LJONANO.

Ni ricevas la sekvantan poŝtkarton subskribitan de Sinjoroj A. Offret, kaj H. Barth.

"Sekretario de Lyona esperantista grupo kaj sekretario de Praga esperantista societo gaje interparolante esperante, salutas vin. Vivu Esperanto,

H. BARTH

Prago, VII, f. 45.

A. OFFRET,

Profesoro ĉe la Universitato de Ljono.

---

**Dictionnaire Esperanto Français avec Grammaire - - 10c.**

**50 centimes**

**Prix spéciaux pour commerçants et clubs esperantistes.**

En Vente aux librairies

# BELARTOJ




FLAMBAĴO

### ESPERANTO ĈIAM EKZISTIS.

Tuj kiam mondo estis kreita, globtero
turnis ĉirkaŭ suno.
Same amerika kontinento tuj estis sur
terglobo
Tuj kiam naturaj fortoj ekzistis, akv-
vaporo posedis sian
Same elektrika forto tuj staris en urboj.
En tuta tempo pendolo iradis regule
Same rado moviĝante staris ekvilibre
Senĉese atmosfero frakasis nin per sia
maso
Same maro obeis astran potencon
Movebla karaktero por anstataŭe plumon,
bezonis nur
Gutemberg'o
Okulvitro posedis de la komenco sian
povon
Radoj X postulis nur scienculo por
montri ilin
Elektrikaj ondoj troviĝis sub mano de
Hertz'o, kaj
Branby'o kolektis ilin.
Terpomo bezonis Parmentier'on por nutri
popolojn
Mikroboj estas tiel maljunaj kiel mondo,
kaj tamen
Estis necesa ke Pasteur'o venu, vidu,
venku !
Homa gorĝo estas fabrikata por elparoli
Kelkajn sonojn, ĉiam samajn, kunligi
per diversaj
Artikoj, sekve, komuna lingvo ĉiam ek-
zistis ĉe
Homoj! Sed Genulo estis necesa por
elmontri ĝin,
Kaj tiu ĉi genulo estas Zamenhof.

Hte. PFEIFFERF.

### PRIPENSOJ PRI PENSOJ

Pensoj grandegaj, al tiuj, kiuj sin
turmentas,
Neniam alvenas, aŭ al tiuj, kiuj
sinvestiĝas
Malkontente; En la Sanktega Preĝejo,
De l'animo, estas necese ke tie paco
Kaj trankvileco ekzistas, antaŭ ol
Ĝiaj fenestroj malfermiĝas ekstere
En tiuj ĉi regionoj senfinaj
La ĉielaj potencoj, Ili ĉiuj moviĝadas
En perfekta silento, tiel la
Stelaro, kaj kiel ĝi, estas en trank-
vileco
Tiel niaj animoj de "Li" en la ĝieloj
Supraj, nur ricevas la visiton mal-
ŝlosi
Kaj malfermi la pordon enkondukantan
En la regionojn de la feliĉegeco.

F. R. GREENWOOD,
kuracisto.

### THOUGHTS ON THOUGHTS.

Great Thoughts ne'er come to those who
fret,
Or clothe themselves in discontent;
Within the Temple of the Soul,
Must there be peace and quietness.
Before its windows open out
Into those regions infinite.
The heavenly powers do all move on
In silence, as the stars, and so
It is in quiet that our Souls
From "Him on High" do but receive
The visit to unlock and hope
The gate unto the "Realms of Bliss".

E. R. GREENWOOD.

## PRI JANKLANDO

Estimata Sinjoro Redaktoro!

Permesu al mi, unu el Viaj legantoj kvankam ne povante pretendi ke mi estas precize esperantisto, tiel esprimi mian intereson je la diversaj artikoloj pri landnomoj proponitaj, publikigitaj antaŭ nelonge en via ĵurnalo.

Inter aliaj ŝanĝoj, oni proponis — ŝercante, mi devas kredi — ke la nomo estonta de nia lando estu "Jankland!" Ankaŭ tiel povus la esperantistaro de la Unuiĝitaj Ŝtatoj proponi — ankaŭ, komprenu min, kiel ŝerco amika! — ke la nomo "Kanado" estu ŝanĝata en "Kanukujo", aŭ ke Nova Skotlando estu konata kiel "Blunazland" — eble, ankaŭ, oni povus proponi rebapton de la "lando de arto kaj de la kanto", la bela Itaujo, kaj ordoni ke ĝi iĝu "Degoujo!" Tiu ĉi ŝercoj, se ili ne devenas el ia genta malamikeco aŭ el nacia jaluzeco — ecoj certe ne ekzistindaj inter ni amikoj de la lingvo internacia — vere produktas nenian malbonon.

Sed ĝi ŝajnas ke iaj korespondantoj de LA LUMO volas akcepti serioze la proponitan nomon! Certe ili ne komprenas ke la akcepto de ia nomo tiel mokanta malhelpus efektive la disvastigadon de ilia amata lingvo inter la anoj de la Unuiĝitaj Ŝtatoj. Precipe ĉe la ŝtatoj sudaj, kie oni uzas la nomon "Yankee" sole por elmontri la anojn de la ŝtatoj nordaj, tiu ĉi nomo devus esti multege malakceptebla; ĉar tie, bedaŭrinde, ĉiuj postsignetoj de la malamikeco kontraŭ la nordanoj estas ne ankoraŭ malaperitaj.

Inter la ecoj plej utilaj de la lingvo Esperanto estas ĝia uzado de la formoj kaj vortoj interraciaj jam ekzistantaj, kaj ĝia disvolviĝo laŭ metodoj modernaj de penso kaj de esprimo. Ĉiuj sistemoj de lingvo arta kiuj estas aspirantoj al la ofico de lingvo internacia devas alproksimiĝi la plej eble al la formoj akceptitaj de la lingvoj naciaj: sekve, la genia aŭtoro de Esperanto elektis la plej bona formo produktebla el tiu ĉi lingvo, nome UNUIĜITAJ ŜTATOJ.

VOLAPUKISTO.

### DEZIRAS AĈETI

Kiu havas por vendi presaĵojn esperantajn elirintajn antaŭ la jaro 1901a bonvolu fari proponojn al C. Jeannenney, 5 rue de Niederbronne, Strasbourg, Alsace, kiu deziras precipe akiri la sekvantajn verkojn: "Dualibro" de doktoro Zamenhof; "Aldo al la Dualibro" de la sama. "Jarkolektojn de Esperantisto, escepte tiuj de la jaroj 1893 kaj 1894.

The "EMPIRE"



Seulement $60.00 (300 francs)

Alignement absolu et permanent

ECRITURE VISIBLE

du commencement a la fin . . .

Nur $60, (Fr. 300).—Enliniigo absoluta kaj daŭra, Videbla skribaĵo, de la komenco ĝis la fino.

**The Williams Mfg. Company, Ltd.,**

**61 FRANCOIS-XAVIER ST., MONTREAL.**

## AN HONEST MAN

We read somewhere that Diogenes once went about the streets of Athens carrying a torch in board daylight, apparently searching for something. When asked what he was looking for, he answered "an honest man."

We do not know whether he succeeded in his quest or not, but what we are sure of is that without going to Athens, or using a torch, we found at least one honest man in Montreal, which does not mean that there is not more than one.

And this materialized in the shape of a professor of French elocution and under peculiar circumstances. The Esperanto course was proceeding under the auspices of the Bernier Club, when the professor entered the room, he was invited to join the class, and one of the pupils presented him with an exercise book. The professor took the book, first read in Esperanto and made very few errors in pronunciation, then made a translation into French, and for this required but very few references to the vocabulary; in fact, the translation was so nearly accurate that all unexpectedy the pupils started to appland and lourdly manifested their amazement at the ease with which the professor was tranlating an Esperanto text at first sight.

Once this experiment was through, the professor addressed the French professor thus;

"It seems to me that Esperanto is so easy to you that you should join the class and learn the language thoroughly, as this experiment is most conclusive."

"No doubt", answered the professor, "Esperanto is wonderfully easy ,but I will wait. and when everybody knows the language, I will see."

Now, some may be inclined to laugh at such an answer, and be induced to reply:

"But what if everybody is as wise or as practical or as egoistic as the professor?"

And very likely this is what prompted the mind of the pupils, the last words uttered by the professor were followed by an uproarious outburst of laughter and nothing more was said.

